*Redakta noto*

## La mult-vizaĝa jaro 2008

1. La Organizo de Unuiĝintaj Nacioj (OUN, mallonge UN) deklaris ĉi tiun jaron **Internacia Jaro de la Planedo Tero**. Estas difinitaj dek ĉeftemoj pritraktendaj:

- La subsurfacaj akvoj – la plej granda provizo de trinkakvo
- La naturaj danĝerfontoj minacantaj la homajn komunumojn
- Tero kaj sano, por konservi la saman vivmedion
- Ŝanĝiĝoj de la klimato – dum la terhistorio kaj nun
- Konscia mastrumado pri la energifontoj kaj mineralaj krudaĵoj
- Esploro de la terinterno, ekkono de ties strukturo
- Esploro de la oceanoj kovrantaj du trionojn de la tersurfaco
- Kreado de scienca bazo por la sekura konstruado kaj funkciigo de megapolisoj
- Daŭrigebla utiligado de la grundoj
- Protekto de la biosfero, de la vivularo de la Tero.

(Ankaŭ en Hungario estas preparata tre riĉa kaj varia programo)

2. UNESKO deklaris ĝin **Internacia Jaro de la Lingvoj**, kun speciala atento pri la protekto de la gepatra lingvo kaj de la minoritataj lingvoj. Por Eŭropa Unio gravas la problemo de la proponata plurlingvismo. Subtenas kaj propagandas tion, kiel konvenan ilon por konservi la lingvan diversecon de Eŭropo, la EU-komisaro pri Lingvaj Problemoj, la rumano *Leonard Orban* (naskiĝinta 1961 en Braŝovo).

3. Por Universala Esperanto-Asocio (UEA) la jaro 2008 estas la **Centjara Jubileo** de ĝia estigo. La centra evento estos la 93-a Universala Kongreso (UK) en Roterdamo, Nederlando.

4. La katolika, luterana kaj kalvinana eklezioj, ekumene, deklaris la jaron 2008 **Jaro de la Biblio**: "Feliĉa estas, kiu legas ĝin" – ankaŭ kune, eĉ preĝante kune.

5. En Hungario, 2008 estas **Jaro de la Renesanco**, kun speciala atento al la regado de reĝo Matiaso (ekz. ekspozicio pri la epoko de la *Medici*-familio en Florenco en la Muzeo de Belartoj).

6. Kaj krome (certe ne fine) deklaris la jaron 2008 **Jaro de la Matematiko** la Iniciativo "Scienco en Dialogo", subtenata de la germana Ministerio pri Klerigado kaj Esploro, kun prelegoj, ekspozicioj kaj aliaj aranĝoj de la Germana Matematikista Asocio (vd. *www.jahr-der-mathematik.de*).

*Prof. D-ro Endre Dudich*



## Ĉu la estonto estas en niaj manoj?

– Neretenebla evoluo kaj subtenebla disvolvo –

*Endre Dudich*

### Enkonduko

Antaŭ ĉio ni klarigu la konceptojn, por kompreni la problemon kaj, se eble, unu la aliajn.

Oni devas klare distingi **evoluon** kaj **disvolvon**.

1. La **evoluo** (evoluado) estas natura procezo, la realigo de ebloj. La latindevena vorto *"evolutio"* laŭvorte signifas "dis-volviĝon". La evoluado de la vivuloj, la filogenezo, estas nereturnebla procezo, kiu progresas ekde la simpla al la kompleksa.

Ĝis nun ne estas decidite, ĉu la pli malfrue estiĝintaj pli kompleksaj estaĵoj estas pli perfektaj, pli super(rang)aj; kaj ĉu tiu unudirekta procezo havas celon (internan aŭ /kaj eksteran), kaj se jes, kio tiu celo estas.

2. La **disvolvo** (angle: *"development"*) **n e** estas natura procezo. Ĝi estas konscia homa agado, individua aŭ kolektiva. Ĝi estas nepre cel-direktita kaj cel-konscia.

La celo estas estigi ion utilan por la aganta homo, en kio estas iu-aspekte pli utila kaj pli valora ol tio, kio ekzistis pli frue. Tio povas esti pli kompleksa, pli komplika, sed povas esti ankaŭ laŭ-cele pli simpla, liberigita de ĉio ne-necesa, kiel la statuo de Davido, kiun Michelangelo liberigis de la superfluaj partoj de la marmorbloko.

Do la disvolvo ne estas unudirekta, sed ĉiam estas direktita al iu konkreta celo, preteratentante (aŭ konscie neglektante) ĉiujn ceterajn faktorojn.

La historio de la homaro evidente rezultas de tiuj du, esence malsamaj procezoj.